

MAJA VESPERO.

(D. Chalupa)

5 an de Majo 1933.

Karaj amikoj, proksimaj kaj malproksimaj, aŭskultantaj nin ĉu en la nordo, aŭ en la suna sudo, ĉu en oriento aŭ okcidento, ĉu en Eŭropo, ĉu en Afriko en la ombro de miljaraj piramidoj, vi ĉiuj akceptu nian koran saluton. Ĝi estas saluto printempa, venanta el lando, kie la printempo ĉiam estis ĝoje bonvenata, kie la alveno de l' printempo signifis al ĝiaj praloĝantoj reviviĝon de la dormanta naturo, kie la printempo igis plena la homan koron per nova espero. Tiel estis kaj estos ja ĉie, sed por ni la reviviĝo de la naturo estis samtempe simbolo de la reviviĝo de nia popolo. Pro tio multaj el niaj komponistoj kaj verkistoj dediĉis al ĝi siajn verkojn.

La maksimumon de l' ĝojo kaj espero prezentas al ni la monato Majo, precipe ĝia unua tago. Unua de Majo! Ĝi estas la tago de granda amo al la naturo, tago de l' amo de homo al homo, tago, kiu per la ideo de l' frateco kunligas ĉiujn popolojn en unu granda familio.

Estu salutata, unua de l' Majo en la floroj de la tuta mondo kaj en la koroj de ĉiuj bonaj homoj kaj ekflorigu ĉie ĝojon kaj gajecon, kaj esperon je feliĉa estonteco spite al la inkubo de la estanteco. Ho Majo, al vi apartenas hodiaŭ niaj vortoj, niaj kantoj, nia muziko. Ilin ofertas al vi la infanoj de la rejuniĝinta lando en Centra Eŭropo kiel modestan dankon por la donacoj de la printempo.

Kaj nun, estimataj, karaj amikoj, estu bonvenataj en nia rondo kaj en la rondo de niaj artistoj. Ilian programon ni komencos per la uverturo al la opero "La vendita fianĉino" de Bedřich Smetana. Tiu ĉi opero estas jam konata en multaj ŝtatoj de Eŭropo kaj rikoltis ankaŭ en Ameriko entuziasman aplaŭdon. Ĝia unua prezentado okazis en la jaro mil-okcent-sesdek-ses en Praha. Tiu ĉi tempo estas la printempo de nia muzikarto kaj ĝuste la "Vendita fianĉino" estas ĝia plej bela floro. Ĝi diboĉas en ĝojo kaj gajeco kaj ĝia ŝaŭmanta uverturo estu la unua programero de nia Maja vespero.

"La vendita fianĉino" de Bedřich Smetana.

Samtempulo de la komponisto Bedřich Smetana estis la verkisto Jan Neruda. Li estis ne nur eminenta verkisto, sed ankaŭ la vivanta konscienco de la popolo kaj glosisto de sia tempo. Ankaŭ li rilatis al printempo kiel homo kun sentema koro kaj dediĉis al Majo gajajn felietonojn. Aŭskultu nun, kion li skribis en la Majo de la jaro mil-okcent-sesdek-ok. Tradukis kaj legas s-ro Jiří Šamla.

Felietono de Jan Neruda.

En la mezo de la pasinta jarcento vivis kaj kreis ankaŭ alia eminenta ĉeĥa artisto, la komponisto Antonín Dvořák, kies komponaĵoj estas en la eksterlando eĉ pli konataj ol tiuj de Smetana. Malpli konataj estas liaj Moraviaj duetoj, komponitaj laŭ niaj moraviaj popolaj kantoj. Aŭskultu nun dueton, kies nomo estas "La kaptitulino". La enhavo de la kanto, kiun vi aŭdos en la originala ĉeĥa lingvo, estas jena:

Bela knabino falĉis proksime de rebejo herbon. La sinjoro, al kiu apartenis la herbejo, vidis ŝin el la fenestro. Li tuj ordonis al sia veturigisto jungi la ĉevalojn kaj li veturis tra la kamparo al la knabino. Timante punon, la knabino donas al la sinjoro la falĉitan herbon kune kun la tuko. Sed la sinjoro prenas ŝian manon, ĉar la knabino plaĉis al li. Sed ankaŭ li plaĉis al ŝi. Kaj la kanto finiĝas per tiu ĉi simpla amkonfeso: Vi plaĉas min, mi plaĉas vin, ni ambaŭ plaĉas nin.

La dueton "La kaptitulino" de Antonín Dvořák kantas opera kantistino sinjorino Vlasta Kubíková kaj koncerta kantistino f-ino Marta Švorčíková.

Falĉis knabino ... Kanto de Ant. Dvořák.

Kaj nun vi aŭdos La humoreskon de la sama komponisto, kiun eble multaj el vi konas.

Humoresko de Antonín Dvořák.

Por kompletigi la komponistan trion vivintan en la mezo de la pasinta jarcento, ni devas ankoraŭ mencii nian Zdeněk Fibich. Li ne tiel famiĝis ekstere de sia patrujo kiel la jam menciitaj Smetana kaj Dvořák. "Antaŭ la vespero", tio estas la titolo de lia simfonia idilio. Ĝi estas unu el liaj plej ŝatataj komponaĵoj, kies parton "La poemo" vi nun aŭdos.

"La Poemo" /Zd., Fibich. /

Ĝis nun ni prezentis al vi la seriozan kaj artan parton de nia programo. Vi estis en la societo de ĉeĥaj artistoj de la pasinteco.

Nun ni forlasos ilin kaj revenos en la estantecon, en la pulsantan vivon de la hodiaŭo, kiu estas pli facilanima, kaj, laŭ sia maniero, pli gaja.

Kia estas la nuntempa gajeco, tion diros al vi la aprila ŝerco, kiun tradukis kaj legos s-ro Jiří Šamla.

Milan Orovan, moderna komponisto, komponis Kanton de l'Majo, kiun kantos nun, la al vi jam konata fraŭlino Zdenka Trdá.

Kanto de l' Majo. Milan Orovan.

Ho jes, tio estas la Majo, la tempo de l'amo. Tiel kantas nia kanto, kaj tiel kantas multaj aliaj sur la tuta mondo. Tio estas natura, ĉar la Maja amo estas ĉie egala. En Francujo same kiel en Italujo, en Germanujo kiel en Hispanujo, en Norvegujo kiel en Jugoslavujo, en Polujo kiel en Hungarujo, unuvorte, ĉie ni renkontus la samajn geamantojn, kiel ĉe ni. Silenta anguleto en ĝardeno aŭ parko, jen la de ili preferata loko, kie ni ekvidus "Lin kaj Ŝin", alpremiĝintaj unu al la alia flustrantaj vortojn de amo. Kiel malmultaj, ofte eĉ tre ridindaj vortoj sufiĉas al la geamantoj! Sed tamen ili perfekte komprenas unu la alian. Pri tio vi tuj konvinkiĝos. Ni starigis nian mikrofonon en arbitrajn malantaŭ benketo de unu el nia granda parko. Mi estas certa, ke ankaŭ nun tie sidas geamantoj, kiuj estas, kiel ĉiam, blindaj kaj surdaj. Aŭskultante ilin, vi kaj ni kulpiĝos per ioma nediskreteco. Sed tamen... Atentu! Ni transŝaltas!

"Li kaj Ŝi".

Vidu kompatindan knabinecon! Tion ŝi certe ne atendis. Sed tio estas nur la kutima printempa fulmotondro. Alia, vera kaj timiga fulmotondro pendas de sur la ĉielo. Jam de longe pluvas, sed ili rimarkis nenion. Nu, Maja amo sen fulmotondro amo eĉ ne estus!

Tia ĝi estas ĉiam, la amo en Majo. Surda, blinda, ĝemanta, koleretiganta, disputanta... sed tamen ĉio ĉiam bone finiĝas. Fino bona, ĉio bona. Ĉe ni la bona fino signifas edziĝan feston kun gaja, danciga, ĉeĥa polko, kiu mem estas la frukto de l' Majaj floroj.

Karaj amikoj! Ni alvenis al la fino de nia hodiaŭa programo kaj ni deziras al vi ĉiuj feliĉan bonan nokton, sed ankoraŭ multe pli feliĉan kaj bonan Majon, sur kies sojlo ni staras.

Nia deziro estas, ke la nunjara Majo estu alvoko al ĉiuj homoj de bona volo kaj pura koro, por ke efektiviĝu la senco de la vorto: Amu! Ne tial, ĉar estas Majo la monato de l' amo, sed por ke plenumiĝu la dia kaj homa ordono, pleniganta nian koron por eternaj tempoj.

Tradukis Th. Kilian
Třebíč, 28.4.1933

Jen la senco de la unuaj vortoj de nia esperanta himno "En la mondon venis nova sento", vortoj promesantaj la alvenon de ĝoja printempo al la tuta homaro.